Nu har farmor blivit rädd för första gången. Rädd för att ramla. Det började efter att hon fick problem med balansnerven och oron har inte släppt. Därför går hon i KBT hos en psykolog.

Det är denna psykolog som är orsaken till att farmor och farfar nu skuttar runt på köksgolvet varje kväll. Genom att dansa med hela kroppen och slänga med huvudet ska farmor släppa på kontrollen och rädslan för att ramla. Gärna till någon musik som gör det omöjligt för henne att sitta still: Chuck Berry.

Farmor berättade för mig en gång att hon aldrig haft en tanke på sin ålder förrän hon fyllde 80 år. Själv minns jag att jag reflekterade över min ålderdom när jag skulle fylla tio, hela två händer gammal. Till skillnad mot farmor har jag nog varit ganska rädd hittills i mitt liv. Ofta rädd för att misslyckas.

När jag gick över Drottningtorget här om veckan oroade jag mig för något som vanligt. Jag minns inte ens vad det var, men något som inte har hänt än var det i alla fall garanterat. Jag hade farmor i telefon och hon lyssnade fascinerat. Inte på mig, utan på ljuden av människor jag passerade eller bussar som stänkte upp vattenblandad snö på trottoaren.

”Vad duktig du är som kan gå och prata samtidigt. Du har väl broddar på skorna?” sa farmor.

Det hade jag inte.

Vi har olika rädslor, farmor och jag. Jag är rädd för att misslyckas och hon är numera rädd för att ramla. Nu dansar vi tillsammans i köket till rockmusik från 50--talet. Efter en stund släpper jag oron över hur mina danssteg ser ut eller om kalopsen kokar över och gör som farmor; slänger med huvudet och viftar med armarna. Jag säger inte att alla mina rädslor försvann där och då, men när

jag dansade med farmor och farfar tänkte jag att många rädslor faktiskt är onödiga. Ramla kommer jag göra, det är bara en tidsfråga den här vintern. Misslyckas kommer jag såklart också att göra. Det gör vi alla ibland. Det har farmor och farfar också gjort. Och nu skakar de av sig det i köket varje kväll till Chuck Berry. Testa ni med!

Anna Hallgren, Världens Gång

Även ett barnbarn kan ha nytta av tipset från farmors psykolog.

Solnedgång – Sunsubiro

de Renate Säfström



Smakprov från gårdagens ögongodis
tornfalk ryttlar högt i skyn
skatan har egen stund på sten
himla många gäss
och
en magisk solnedgång

Gustumaĵoj de la hieraŭa okulĝuo
turfalko atendente alte en la ĉielo
la hematopo havas sian propran momenton
sur ŝtono
multe da anseroj
kaj
magia sunsubiro



Finna arkitekto Alvar Aalto


de Raita Pyhälä

La familia nomo "Aalto" signifas "ondo", eble tial arkitekto A. Aalto amuziĝis provante ondigi kelkajn siajn verkojn, ĉu el ligno, vitro aŭ betono. Ondaj linioj jen kaj jen vidiĝas en liaj konstruaĵoj, ekzemple en la plafono de la biblioteko de Viborgo.

La geedzoj Aino kaj Alvar Aalto helpis kaj influis unu la alian. Alvar ĉiam menciis la kunlaboron kun sia edzino. Ambaŭ estis arkitektoj sed ankaŭ dizajnistoj. Ili dizajnis ceramikaĵojn, lampojn, meblojn. Tre konataj estas la florbazo Aalto kaj la seĝo Aalto. La Ondo-florbazo daŭre aĉetebblas en pluraj koloroj, sed la plej multekosta kaj rara estas la ruĝa, ĉar ruĝa vitro postulas pli da tempo kaj scio de la vitristo. Aino kaj Alvar samopiniis pri la ideo de svedo Gregor Paulsson, kiu volis havigi al la aĉetantoj "vackrare vardagsvara" – pli belaj ĉiutagaj aĵoj por ĉies hejmo. Tri jarojn post la morto de Aino pro mamkancero Alvar edzinigis Elissan, kiu same estis arkitekto.



Alvar Aalto kiel studento ...




... kaj kiel skulpturo.

En la arkitektura flanko Alvar Aalto famas pro tio, ke li provis harmoniigi siajn konstruaĵojn kun ties ĉirkaŭaĵoj. Li ŝatis flugi per malgrandaj aviadiloj por larĝe vidi la ejon, kie lia konstruaĵo staros. Li atentis pri la topografio kaj vegetaĵo, precipe la arboj. Poste li volis mebligi kaj harmoniigi la enon de la domo ĝis la plej malgranda detalo. Por vidi liajn domojn, preĝejojn kaj kulturcentrojn serĉu fotojn per Google. En Helsingfors staras ekzemple Kulturhuset kaj Finlandia-huset, sed troviĝas konstruaĵoj de li ankaŭ en aliaj landoj de la mondo, ĝis Usono, Rusio, Bangladeŝo, sen forgesi Svedion.



Pli belaj ĉiutagaj objektoj – Vackrare vardagsvaror.



Politike A. Aalto subtenis la dekstrulojn en la Civitana Milito de Finnlando en 1918, sed dum sia longa vivo li eniris maldekstrulajn cirklojn artistajn. Ĝuste antaŭ la komenco de la milito kontraŭ Sovetio en 1939 la geedzoj Aalto vojaĝis al Usono por serĉi sekurecon, sed malgraŭ liaj militotimoj ili tamen revenis al Finnlando antaŭ ol la lasta konekto, Peĉengo, fermiĝis. Dum la milito en la 1940aj jaroj la finna ŝtato ne devigis la arkitekton partopreni en la bataloj.

La kariero de Aalto kulminis en la 1950aj jaroj. Li membris en les Congrès Internationaux d'Architecture Moderne kaj Finna Arkitekta Ligo. Turistoj nun vizitadas liajn muzeojn en Jyväskylä kaj Helsingfors kaj helpe de mapoj rondiras por vidi liajn konstruaĵojn. Krome, li planis ne nur unuopajn konstruaĵojn sed tutajn prikonstruotajn areojn. Li kreis modernismon kaj funkciismon por anstaŭigi romantikismon kaj klasikismon.



La Aalto-muzeo en Jyväskylä, www.alvaraalto.fi

Ĉiela enigmo: Angulo de la diametro de luno kaj suno


de Carl-Olof Selenius

Anguloj sur la ĉielo

”Kiom da gradoj super la horizonto estas la luno”, iu demandas, kaj vi etendas la brakon: Se inter la horizonto kaj la luno estas spacon por unu el viaj pugnoj, la respondo estas 10 gradoj, se necesas du pugnarĝoj: 20 gradoj. Tio estas praktika regulo.

Por taksu pli malgrandajn angulojn sur la ĉiela duonsfero, oni povas anstataŭe kompari ilin kun la diametro de la luno. Ĝi estas – same kiel la diametro de la suno – relative precize duonan gradon. Tiu fakto, ke ambaŭ estas tre proksimaj al 0,5 gradoj – ĉiam – estas memorinda afero. Do: Kiom granda estas tra la luna disko, same kiel tra la suna disko, tiom granda estas duongrado.

Enigmo: Je kioma distanco estas la suno de la lunarko? Skal-linioj estas desegnitaj inter la suno kaj la luno por helpi.



Solvo: Ĉirkaŭ 20 sunoj povus esti metitaj inter la suno kaj la luno. Tio estas markita per la skalo. Dudek duongradoj estas dek gradoj. Ili do estas dek gradojn dise. (Tiam oni strikte kalkulis inter la plej proksimaj randoj, do estos unu suno pli se oni kalkulas la distancon inter iliaj centroj – kio estas ankoraŭ proksime al 20.)

La esperantlingva versio de *Titta på himlen* estas nun preta. Uzu la ligilon:

https://eo.wikibooks.org/wiki/Rigardu_la_%C4%89ielon

Ĉiela enigmo: Birdo kaj ombro

Enigmo pri suno kaj luno

La luno estas nia plej proksima kosma najbaro. Nur la homfaritaj satelitoj, kosmoŝipoj en orbito ĉirkaŭ la tero, estas pli proksimaj. (Kaj la tero, kompreneble, sur kiu ni staras, estas treege proksima.) De la luno oni ofte vidas nur tiun flankon, kiun la suno lumigas, dum la ombroflanko aperas nur malklara aŭ tute ne.

Trovu kvar erarojn en ĉi tiu bildo de birdo staranta sur paliso:



Solvo

La jenaj aferoj estas malĝustaj sur la bildo:

1. La paliso sur kiu staras la birdo havas ombron sur la suna flanko.
2. La supra nubo havas ombron sur la suna flanko.
3. Stelo estas videbla kie estas la ombrita parto de la luno. (Tio estas kiel la emblemo sur la flago de Alĝerio. Vidu malsupre.) Ĉar la luno estas la plej proksima ĉiela korpo, la stelo ne povas aperi antaŭ la luno, kaj se ĝi estus malantaŭ ĝi, ĝi estus kaŝita kaj ne videbla. – La ĉiela korpo Luno estas sfera kaj ne havas truon en si, aŭ niĉon, tra kiu stelo povus esti videbla. Kio estas desegnita estas la lumigita duono, tiu videbla tra la blua brilo

de la aero; pri la alia duono, oni devas memori, ke ĝi estas tie.

4. La ombro de la luno ja estas sur la ĝusta flanko, sed ĉar la suno estas multe pli for ol la luno, kaj ĉar ŝajnas, ke la suno kaj la luno aperas proksimaj (nur duongradon distance), la sunlumo devas eniri sur la "dorso" de la luno, sur la flanko, kiun ni ne vidas. Tial ni povus vidi preskaŭ nur ombron – eble kun tre maldika lumigita rando sur la suna flanko, same kiel oni povas vidi maldikan lumigitan randon sur la brusto de la birdo. La luno do estu kiel gracilega rikoltito kaj ne kiel larĝa lunarko.

Bildoj de la flagoj de Turkio kaj Alĝerio. La flagmotivo de Turkio povus aperi sur la ĉielo dum tiu de Alĝerio devus esti konsiderata kiel nur kombino de emblem-elementoj.



Flago de Turkio.



Flago de Alĝerio.

/ Carl-Olof Selenius

El la esperanta versio de KOSMOS

Ole Terkelsen sendis la revuon. La origino estas skribita en la dana.

Zamenhof – la monda lingvo Martinus – la monda moralo

Zamenhof silentis pri sia propra persono, kaj eĉ la homoj plej proksimaj al li ne sciis pri lia religieco. Ili nur spertis lian kondutmanieron, li estis bonkora, pura, modesta, helpema, sindona, mirinde pacienca, li neniam impresis ofenda, ĉu en vortoj ĉu en agoj, kaj ĉiam estis simpatie aŭskultema al ĉiuj homoj.



Zamenhof – la monda lingvo

Martinus – la monda moralo

Elstarajn esperantistojn, kiuj eble en periodoj opoziciis lin aŭ kontraŭlaboris Esperanton, li laŭdis en siaj kongresaj paroladoj kaj dankis ilin pro la bonaj klopodoj, kiujn ili malgraŭ ĉio kontribuis al la Esperanta afero.

Al ĉiuj homoj – edzino, gefratoj, gefiloj, genevoj, amikoj, pacientoj – li ŝajnis esti sanktulo. En siaj malfacilaj horoj ili ĉiuj venis al li kaj petis lian konsilon.

"Li neniam pekis", diris malnova servistino pola, montrante lian portreton sub ŝia krucifikso sur la muro. Kiom da famuloj restis

grandaj en la okuloj de l' servantoj? (Edmond Privat, Vivo de Zamenhof).

Al la malgranda Ludoviko estis same kiel al H.C. Andersen: La patrino estis profunde religiema, kaj la patro estis ateisto. Ambaŭ infanoj komence estis religie tre kredantaj same kiel la patrino, sed iom post iom ili tenis sin pli racie, kaj sekve kritike, al la dogmoj de la katekismo. Ĉe Zamenhof tio evoluis ĝis tio ke li eĉ iĝis ateisto kaj frontis vivkrizon kun spleno, estante 15–16-jara.

Kelkajn jarojn poste li sentis sin, verŝajne intuicie, konvinkita pri la senmorteco de la animo kaj la ekzisto de Dio. Kiam Zamenhof mortis en 1917, 57-jara, li postlasis sur sia skribotablo kvar paĝojn kiuj estis la preparado de artikolo pri la senmorteco de la animo kaj priskribo de liaj propraj vivpercepto kaj religieco. Kiel dirite, li antaŭe ne parolis pri tio, sed sur la unua paĝo li skribis ke li nun sentas ke li devas fari tion. Li klarigas ke ĉio tio kion li nun skribos, naskiĝis en lia kapo jam antaŭ 40 jaroj, kiam li estis 16–18-jaraĝa.

Tiuj pensoj kiujn li havis pri reguleco en la naturo, pri senmorteco kaj Dio, restis esence senŝanĝaj poste.

La tri unuaj paĝoj enhavas enkondukon kun pluraj rezervoj kaj senkulpigoj, ĉar li antaŭvidis ke multaj raciaj esperantistoj ne ŝatos ĉi tiun religian konfesion, eĉ ke la kredantoj ĝin ne ŝatos, ĉar lia percepto estas tute alia ol tiu de la kredantoj.

Mortante li estis komencinta nur la kvaran paĝon, kaj tiu teksto finiĝas priskribante la vivokrizon kiun li travivis kiel 15–16-jarulo en sia ateisma periodo. Per tiu enkonduko finiĝas lia religia konfeso. Aparte tamen estis kelkaj notoj pri io nova, kion li travivis kiel 17-jarulo: "Mi eksentis ke eble morto ne estas malapero ...; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo ...; ke io min gardas al alta celo ...".

Lige kun sia laboro pri la internacia lingvo Zamenhof skribis en la frua poemo *Mia penso*, ke se liaj streboj ne plaĉos al la sorto, li preferos morti. – Imagu, tiel profunde tiu misio de la mondlingvo estis inokulita al la juna L. Zamenhof!

Tiel do ne estis la intenco de la Providenco ke la religia vivpercepto de Zamenhof publikigu, sed hodiaŭ ni ja povas konsoli nin per tio ke **Martinus** priskribis la evoluŝtupojn de la genio kun ĝia intuicia kaj universala percepto de la vivo, la naturo kaj la kosmo: **La religia evoluo de Zamenhof de infanaĝo kaj junaĝo**

ĝis matura aĝo pasis laŭ la sama ordo kiel tiu de la tuthomara evoluo, kiu trapasas unue kred-religian stadion, sekvatan de stadio racia, ateisma kaj materiisma, kaj fine atingas individuan, intuician kaj kosman religiecon.

9. Ĉu la juna Martinus publikigis sian religian percepton?

En sia libro *Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio* Martinus skribas, ke lia propra religieco estis sekreto. Martinus: "Mi estis profunde religiema kaj havis pasian amon al Dio. Mi fizike ne povas memori eĉ unu tagon kiam mi ne preĝis al Dio. Sed tiu mia religieco estis mia sekreto, estis mia sanktaĵo. Jesuo estis mia plej granda idealo kaj gvidanto. Ĉe ĉiu dubo mi ĉiam starigis la demandon jene: kion farus Jesuo en la koncerna situacio? – Kaj la respondo ĉiam venis tuj." (*Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio*, ĉap. 13).

Simile al tio Zamenhof iam diris en kongresa parolado al junaj kristanoj: "Mi estas nur hebrea homarano liberkreda; sed kio pli bela en la mondo ol plena sekvado al la instruo de Jesuo?" (Edmond Privat, *Vivo de Zamenhof*).

Martinus priskribas per jenaj vortoj la retenemon de evoluintaj homoj rakonti pri sia vivpercepto: "Ĉar la estuloj tie atingis nivelon, kie ili sentas grandan respekton aŭ toleremon al religiaj opinioj kaj konceptoj de aliaj estuloj malgraŭ tio, ke ili ja mem forevoluis de ili, oni neniam aŭdas ilin kritiki aŭ partopreni diskuton, kaj fakte tre malofte tiuj estuloj esprimas sin pri sia propra speciala koncepto pri la vivo krom post insista instigo, kaj nur en okazoj kiam tio eventuale havas la eblecon esti absolute utila.

*El libreto n-ro 14, La kreado de la konscio.
Traduko Jens Stengaard Larsen.*

Nur du el la 20 punktoj mi kunprenis.

/Siv

Abonu Eo-Kosmos kiel pdf-dosieron

Retpoŝte vi senpage povas aboni Eo-Kosmos kiel al kroĉitan pdf-dosieron. Sendu vian peton al la Esperanto-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Ĉi tie legeblas Kosmos-revuoj en ĉiuj haveblaj lingvoj:

<https://bc.pressmatrix.com/da/profiles/7e2b65761307/editions>

Printempaj revoj

de Tatyana Auderskaya, Ukrainio

Densiĝis krepusko. La kapoj sin klinis unu al la alia, la interparoloj fariĝis pli obtuzaj. Sed des pli arde brilis en malluma ĉambro nesatigebla brulanta malamo.

– Oni devas mortigi lin. Li ne devas vivi. Li ne rajtas vivi. Ne regu nin la persono, kiu ĉiuflanke superas nin.

– Jes, tio vere neelteneblas. Ĉiutage, ĉiuminute konscii, ke li reale estas supera: scias pli multe, pli rapide pensas, pli sukcese solvas la problemojn, kaj ĉiuj liaj solvoj estas ĝustaj! Ili gvidas al la venkoj, sed tiuj venkoj estas LIAJ!

– Kaj ni ne povas kundividi ilin! Ni ne farus, ne kondukus tiel, kiel li, kaj do ne povas senti nin venkintoj, kvankam ni servas al li. Li ne estas nia, kaj ni ne estas kun li. Liaj venkoj ne estas niaj venkoj.

– Li konstante humiligas min per la tuta sia vivo mem. Kial li sukcesas en ĉio? Kial oni amas lin, sed min ne? Li eĉ malamikojn pardonas, kaj ili transiras al lia flanko. Sed miaj malamikoj ja malamas min!

– Jes, jes! Ĝuste tion mi neniam pardonos al li. Mi scipovas batali, mi konas la malamon al la malamiko, kaj tiu malamo gvidas min en

batalo. Mi neniam kompatis iun, kaj oni ne kompatis min. Sed li – pardonas! Kaj venkas pli ofte, ol mi! Mi ne toleros tion!

– Kaj mi lin malamas pro tio, ke li povas pli multe, ol ordinara homoj en ordinara vivo. Kian rajton li havas esti supera? Rompi ĉiujn regulojn, stari super la amaso? Li povas samtempe legi, paroli kaj skribi, sed normala homo ne! Tio ne estas juste!

– Ankaŭ mi ne povas legi kaj paroli simultane. Kial li povas? Mi ne volas, ke ekzistu iu, kiu estu pli saĝa, pli lerta, pli prudenta, ol mi; ke iu povu kaj scipovu pli multe! Kaj se tia homo ekzistas – li ne ekzistu plu! Ne ekzistu iu pli dotita, pli perfekta, ol mi!

– Jes, vi ĉiuj pravas. La plej neeltenebla afero estas toleri la regadon de persono, kiu regas nin laŭmerite, laŭ siaj realaj avantaĝoj, kaj ni eĉ ne povas kontentigi nin per la kliŝoj kiel «Eĉ la Suno havas makulojn» kaj «Ajna homo estas neglektinda humila vermo». Jes, ni ĉiuj estas senbrilaj kaj senpovaj, sed ni multas! Ni povas ataki lin ĉiuj kune, kaj li mortu!

(Ĉiuj kune:) Li mortu!

Densiĝis krepusko. Estis vespero de la 14a de marto de 44a jaro a.K.



Kiu famulo mortis en la jaro 44 a. Kr? Ĉu li? Ĉu Julius Cæsar? En sveda televida programo, li estis rigardata tre prospera, sed gajnis siajn venkojn per tre kruelaj metodoj. Fine grupo, kiu volis protekti la republikon kontraŭ la diktatoro Cæsar, murdis lin en marto 44 a. Kr. Sed kiu estas la parolanto en la teksto?

demandas al vi /Siv

El Dulingva bulteno de la Albana Esperanto-Instituto

La Tagon de la Gepatra lingvo oni atentigis en Albanio. **Bardhyl Selimi** sendis la bultenon al ni.



Bildo farita de UEA.

El Vikipedio pri Albanio

Albanio estas lando kun netuŝitaj strandoj, montaj pejzaĝoj, tradicia kuirarto, arkeologiaj artefaktoj, unikaj tradicioj, malaltaj

prezoj kaj la sovaĝa etoso de la kamparo. La lando havas ampleksan arkeologian heredaĵon; ĝi estis parto de Antikva Grekio, la Romia Imperio kaj la Otomana Imperio ĝis sia unua sendependecdeklaro en 1912, iĝante reĝlando kaj poste komunista diktaturo antaŭ iĝi demokrata respubliko.

Albanio estas unu el nur kelkaj islamaj plimultaj nacioj en Eŭropo.

La bona klimata kondiĉo permesas turismajn agadojn sur la marbordo de aprilo ĝis oktobro. Por la resto de la jaro, ekzistas multaj cellokoj por amantoj de vintra turismo.

Sendita de Herman. D.

La origino de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

Ne konfunzu ĝin kun "Eŭropa tago de lingvoj".

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo estis proklamita la 21-an de februaro 1999 je propono de la Unesko al la Unuiĝintaj Nacioj.

Unesko prunteprenis ĝin de Bangladeŝo kie en tiu tago en 1952 sep junuloj martiriĝis por denaska lingvo, la lingvaj rajtoj de la bengala.

Tiun tagon UNESKO celebras ĉiujare kun la nomo *Tago de la Patrina Lingvo* en siaj ses oficialaj lingvoj.

Homoj, kies denaska lingvo ne (aŭ ne sufiĉe) evoluis el la vidpunkto de terminologio kaj faklingvoj aŭ al kiuj oni ne donas la eblon utiligi sian denaskan lingvon kadre de edukado, trejnado, alirado de informoj aŭ interagado en sia laborloko, tendencas postresti.



Fonto:

<http://www.wefer-roehl.de/photos/bangladesh.htm>

Ŝahid Minar aŭ la martira monumento en Bangladeŝo, kiel memorigo al la viktimoj de la 21-a de februaro 1952 dum manifestacioj por la **Movado por bengala lingvo** (bengale: ভাষা আন্দোলন; Bhaŝa Andolon), celante lingvaj rajtojn por bengalparolantoj.

Har du gamla tidningsurklipp

som på något sätt handlar om esperanto i Sverige?

Kolla i så fall in hemsidan


<http://biblioteko.esperanto.se> →

Tidningsurklipp, där man hittar tidningsurklipp som Sten Svenonius

skannat och jag lagt upp. Om du inte hittar dina tidningsurklipp där, kontakta Sten: esperantoagado@outlook.com som gärna vill komplettera samlingen. *Andreas*

Kantistinoj, kiuj kantas esperante

Vanda Haughton atentigis nin ke troviĝas trezoroj de esperanta muziko Interrete. Dankon Vanda! Bonas ke ankaŭ troviĝas subtekstoj!



El Interreto:

**Cristina
CASELLA**

(naskiĝis en
1984) estas itala
kantistino kaj

esperantistino. Ŝi naskiĝis en suda Italio kaj loĝas en Romo, kie ŝi magistriĝis pri komunikado kaj nun okupiĝas ankaŭ pri esplorado en la krimologia fako.

En la jaroj 2017 kaj 2020, ŝi publikigis ĉe Youtube esperantlingvajn versiojn de 7 kantoj de Adele, Katy Perry, Pink, Lady Gaga kaj Lewis Capaldi, ĉiuj tradukitaj de Roberto Pigro. Inter tiuj ĉi kantoj, Ha lo (Hello) de

Adele fariĝis plej populara. En aŭgusto 2023, la koncerna filmeto ĉe Youtube havis jam pli ol 623 000 spektantojn, kio estas rekordo inter esperantaj videoj.

En la Esperanto-movado ŝi konatiĝis krome kiel korespondanto de Monato en Italio. Ekde 2016, ŝi publikigis multajn artikolojn en tiu internacia magazino, precipe pri sia hejmlando kaj pri scienco.

En la Universala Kongreso **2018** en Lisbono, ŝi ricevis Diplomon pri elstara arta agado de UEA "pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, kiel kantisto de pluraj mondscale konataj nuntempaj kantoj, tradukitaj al Esperanto, kies videoj furoras ĉe Youtube kaj sociaj retoj".



Kantoj de Cristina Casella

Ha Lo: <https://www.youtube.com/watch?v=exIDp2vIkMw>

Someone you loved (Lewis Capaldi) - Esperanto version:

<https://www.youtube.com/watch?v=9vRKsPR1sRc>

Rimarku: La du unuaj bildoj ne estas pri Christina Cassella, sed pri du kantistoj, kiuj kantas siajn kantojn – Adele kaj Lewis. Ili troviĝas sur la videoj. Malsupre bildo de Christina Casella.



La vivo rozas (Edith Piaf) – Joëlle Rabu – Esperanto music

El Interreto: **Joëlle Rabu** naskiĝis en 1958 en Winnipeg, post ke ŝiaj gepatroj enmigris el Francio. Ŝi elkreskis en Courtenay, Vancouver Island.

Kiam ŝi estis 16-jara, ŝi dum tri jaroj ĉirkairis kun amiko por sperti la kulturojn kaj lingvojn de la tuta mondo. Ŝi revenis por labori en la familia turista entrepreno, ĝis ŝia frato instigis ŝin serioze okupiĝi pri kantado: Li prezentis ŝin al Ray Michal, la direktoro de la Urba staĝo de Vancouver. Ŝia debuto en 1983 en la muzikalo Piaf, ŝiaj kantoj kaj amoj faris ŝin konata por pli granda publiko. La muzikalo iris dum la tuta jaro. La plej longa tempo en la historio de muzikaloj en Vancouver.



Se vi serĉas pliajn esperantokantojn, vi trovos plurajn per:

www.youtube.com/@esperantlingvajkantojkunsu8583

Agrablan aŭskultadon kaj dankon al Vanda!

/Siv

La vojo, kanto farita de L.L. Zamenhof



La vojo | Originala kanto en Esperanto – YouTube
<https://www.youtube.com/watch?v=lmofzCwve9I>

Tra densa mallumo briletas la celo,
al kiu kuraĝe ni iras.

Simile al stelo en nokta ĉielo
al ni la direkton ĝi diras

Kaj min ne timigas la noktaj fantomoj
nek batoj de l'sortoj, nek moko de
l'homoj
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!

Eĉ guto malgranda, konstante frapante
Traboras la monton granitan

L'espero, l' obstino kaj la pacienco
ĝen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝos
pri l'tempoj esontaj pensante,
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas
ni semas kaj semas konstante

"Ho ĉesu!" mokante la homoj admonas
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos
se vi pacience eltenos."

≡Aprilaj ŝercoj≡

La kutimo de aprilaj ŝercoj devenas de la mezo de la 17-a jarcento. Oni ofte uzis rimojn kaj infanrimojn.

La trompita homo povus esti sendita en diversajn misiojn: Al ĉarpentista metilernanto oni povus diri: – "Iru aĉeti vid-angulilon kaj iom da najla oleo!" (*malfacile tradukebla*).

En 1742, "aprila noto" estis sendita al paroĥanaro en Västergötland. Ĝi diris, ke la diservo komenciĝos pli frue ol kutime. Kiam la ŝerco malkaŝiĝis, estis granda indigno inter la eklezianoj, kiuj senbezone staris kaj malvarmis.

Dum la 20-a jarcento, amaskomunikiloj multe partoprenis en la ŝercado, sed jam en 1840 la Evening Standard en Londono havis anoncon pri azenekspozicio en la periferio de la grandurbo. Multaj iris tien kaj vane serĉis azenojn, ĝis ili komprenis, ke ili mem estas la azenoj.



En 2008, la loka trafiko de Stokholmo havis ŝercon pri pantofloj. Ili estos malpermesitaj ĉar ili generis statikan elektron kaj minacis haltigi la biletsistemon.

Göteborgs-Posten enfokusigis la knaritajn italajn tramojn. Nun oni trovis solvon por eviti la bruon. "Post profunda esploro, Spårvägen nun trovis solvon al la problemo: hispanaj arbarhelikoj".

La helikoj estus uzotaj kiel lubrikaĵo. Sed estis zorgo pri kiel akiri tiom da helikoj kiom necesas.

Seden med aprilskämt går tillbaka till 1600-talets mitt. Rim och ramsor användes ofta.

Den lurade kunde skickas ut på olika uppdrag: Till en snickarlärling kunde man säga: – "Gå och köp en synvinkel och lite spikolja!"

April! April!



1742 sändes en "aprilsedel" ut till en församling i Västergötland. Där stod det att gudstjänsten skulle börja tidigare än vanligt. Då skämtet avslöjades blev det stor förargelse bland kyrkobesökarna, som stått och frusit i onödan.

Under 1900-talet har medierna tagit hade stor del i skämtandet, men redan 1840 hade Evening Standard i London en annons om åsnevisning i utkanten av staden. Många åkte dit och letade förgäves efter åsnor tills de förstod att det var de själva som var åsnorna.

2008 hade Stockholms lokaltrafik ett skämt om foppatofflor. De skulle förbjudas då de alstrade statisk elektricitet och hotade att slå ut biljettsystemet

Göteborgs-Postens aprilskämt 2013 fokuserade på de gnisslande italienska spårvagnarna. Nu hade man kommit på lösningen för att slippa oljudet. "Efter en gedigen utredning har nu Spårvägen hittat en lösning på problemet: spanska skogssniglar".

Sniglarna skulle användas som smörjmedel. Men fanns en oro över hur man skulle få tag på så många sniglar som det behövdes.

Vinoteket åker runt i stan, medan Chalmers tekniska högskola lägger ut ledningar åt olika

La vinbutiko ĉirkaŭiras la urbon, dum kiam Chalmers Universitato de Teknologio aranĝas tubojn disen en la grandurbo por faciligi alkoholliveraĵojn.

2016: Vi povas facile fari vian propran bieron: Sodaj tablojdoj de Carlsbergs Bryggeri (bierfarejo) estus metitaj en akvon, kiu iĝas bongusta biero.

Hodiaŭ, mi pensas, ke homoj estas laciĝis pri la aprilaj ŝercoj. Estas tiom da falsaj novaĵoj, ke vi povas amuziĝi provante trapenetri ilin...

/Siv

håll i staden för att underlätta spritleveranserna.



2016: Enkelt kan man själv tillverka sitt öl: Brustabletter från Carlsbergs Bryggeri läggs i vatten, som blir till välsmakande öl.

Idag tror jag man är trött på aprilskämt. Det finns ju så mycket fake news man kan roa sig med att försöka genomskåda. /Siv



Oni enŝovas roztigon en terpomon kaj vidu, kio okazos semajnon poste! Man sticker in en rosstjälk i en potatis och se vad som händer en vecka senare!

Oni enŝovas roztigon en terpomon kaj vidu, kio okazos semajnon poste! Nekredeble!

Transformu unu rozon en tutan rozarbeton baldaŭ!

Bela florbukedo sur la kuireja tablo povas heligi la plej nuban tagon, ĉu ne? Bedaŭrinde, floroj estas sufiĉe multekostaj, precipe se vi devas forĵeti ilin post nur kelkaj tagoj.

Sed helpe de la lertaĵo, kiun ni hodiaŭ dividas, vi povas kreskigi vian propran belan florbukedon!

/Siv

Man sticker in en rosstjälk i en potatis och se vad som händer en vecka senare! Otroligt!

Förvandla en ros till en hel rosenbuske på nolltid!

En vacker blombukett på köksbordet kan förgylla den mest molniga dag, eller hur? Tyvärr är det ganska dyrt med blommor, särskilt med tanke på att man tvingas kasta dem efter bara några dagar.

Men med hjälp av knepet vi delar med oss av idag, kan du odla din egen vackra blombukett!

/Siv

El la fejsbuko de Jan Hellström

Från Jan Hellströms facebook



La 18/3 okazis promeno en Älvängen, Harestad kun aprezita vizito al bona amiko kaj birda koncerto de ruĝakselaj turdoj.

Ankaŭ tamburanta granda buntpego, du furaĝantaj longvostaj paruoj kaj prova kanto de ĵusalveninta ĉifĉafo (filoskopo).

Den 18/3 blev det en promenad i Älvängen, Harestad med ett uppskattat besök hos en god vän och fågelkonsert av rödvingetrastar.

Dessutom en trummande större hackspett, två födosökande stjärtmesar och en trevande sång från en nyanländ gransångare.



Estus interese scii kiuj birdoj vizitis ĉi tiujn arbojn dum ĝia vivo.

Kelkaj bildoj de 23/2 2017 Okcidentssvedie

Skulle varit intressant att veta vilka fåglar som besökt dessa träd under deras livstid.

Några bilder från 23/3 2017 i Västsverige



Tusilago ĉe Göta Rivero – Tusilago vid Göta Älv



"Akcipitra strigo"
(*Surnia ulula*) –
Hökuggla

Kvar arbarstrigidoj, ringumitaj – Fyra
kattuggleungar ringmärkta



Serĉado por ludanta arbalaŭdo sur la
senarba montego. – Spaning efter
spelande trädlärka på kalfjället.

